# HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

**Nro. 81 - 1973**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 29 - BILBAO-5




BILBAO INVITAS VIN

# EN HAVO


Noto.................... 1
Ĉu ? ? ?................ 2
16ª Internacia.ktp...... 3-4
BILBAO invitas vin...... 5-6-7
La miraklo de Bilbao.... 8-9
Feliĉo de la Brasiko.... 9
29ª IJK Sarajevo ....... 10-11
Tiuj teruraj maŝinoj.... 11-12


# NOTO

En la nº 77ª de nia revuo, ni skribis ke SE-MED-73 okazus en Hispanio, ĉar ĝi tiel estis proponita al ni de la organizanto, sed poste ili informis al ni ke dum SE-MED 72 la partoprenintoj elektis la urbon **BARI** (Italio) por la okazigo de SE-MED -73 .

Ni informas vin pri tio, ĉar oni sciigis al ni pri publikigo en kelkaj revuoj rilate al SE-MED-73 en Alikante aŭ Barcelono.

Do, per tiu-ĉi noto ni deziras klarigi ke ĝi ne okazos en Hispanio sed en Italio (Bari), laŭ ni estis informitaj.



LA ESTRARO

# ĈU???



"Ni malsatas,ni soifas,ni restas sen hejmo,kaj niaj infanoj havas tristajn okulojn".

Antaŭne longe,mi aŭdis kaj vidis televide tiujn malfeliĉajn homojn kiuj ankoraŭ restas en Managuo.

Do,kien falis la manĝaĵoj kaj mono por ili kolektitaj?.

Kiel estas eble,ke ni,la tuta homaro,daŭrigu sen vidi,sen aŭdi tiom da krioj?.

Ĉu,la amo inter la homoj nur estas ridinda mito?.

Ĉu,ni rigardas la aliulon kvazaŭ barilo kiu devas esti detruita por atingi nian celon?.

Tamen,kiam okazas katastrofo,ĉie oni organizas monkolekton kaj festivalojn por la domaĝitoj.

Ĉu,helpi ilin estas la vera ideo? Ĉu,ili ricevas iom?.



VIETNAMIO,BIAFRO,BANGLADEŜO,MANAGUO...

Demandoj sen respondo,ĝis...kiam???

MARIA







16a+internacia+seminario+de+germana+esperanto+junularo+pri+la+temo+la+manipulata+homo+27an+decembro+1972+ĝis+3an+januaro+1973+16a+internacia+seminario+de+germana+esperanto+junularo+pri+la+temo+la+manipulata+homo+27an+decembro+1972+ĝis+3an+januaro+1973+16a+internacia+seminario+de+germana+esperanto+junularo+pri+la+temo+la+manipulata+homo+27an+decembro+1972+ĝis+3an+januaro

# 16a internacia seminario de germana esperanto-junularo pri "la manipulata homo".

Germana Esperanto-Junularo ĉiujare organizas Internacian Seminarion. Post dek ses da ili la internaciaj seminarioj de GEJ akiris gravan prestiĝon internancian pro la altnivelaj temoj, kiujn oni pritraktas dum ili, kaj pro la bona kaj zorgita organizado.

Du hispanoj, Pilar MALÓN kaj Johano GUIÑÓN, ĉeestis la ĉijaran IS. Ili rakontos al ni siajn impresojn pri la Seminario.

KIE KAJ KIA ESTIS LA SEMINARIEJO ?

PILAR : La ejo de la Seminario, JUGENDHOF IM BESSUNGER FORST, estas junulara restadejo kiu situas en la ĉirkaŭajoj de Darmstadt, meze de bela kaj pitoreska arbaro. La seminarianoj dormis en komfortaj dormsalonoj, kaj vespere ne estis fermhoroj. Salonetoj kun ŝercaj nomoj (TRUO, BOTELO, KALSONO, KAVO, SALONO, KARILJONO, ktp.) estis uzeblaj ĝis kiam ajn.

KIOM DA PARTOPRENANTOJ ĈEESTIS ?

JOHANO: Preskaŭ sepdek gejunuloj el dek kvin landoj.

KIU ESTIS LA ĜENERALA TEMO DE LA SEMINARIO ?

J. : La gvida temo estis "LA MANIPULATA HOMO"

TIU TEMO ESTAS SUFIĈE AMPLEKSA. KIU ESTIS LA LABORMETODO ?

P. : Sub la kadra temo oni starigis kelkajn laborgrupojn en tri blokoj. Ĉiu bloko havis tri laborgrupojn. Tiel, ĉiu partoprenanto havis la eblecon ĉeesti en unu el la tri laborgrupoj de ĉiu bloko.

KIUJ LA TEMOJ DE LA LABORGRUPOJ ?

J. : Ili estis: REKLAMO, PSIKOLOGIAJ TESTOJ, KON-

CEPTOJ PRI POLITIKAJ KONTRAKTOJ, MANIPULADO PERE DE AMASMEDIAJ KANALOJ, MANIPULADO DE SOCIAJ STATISTIKOJ, MINORITATOJ, kaj DE INFORMO AL INFORMILO.

P. : Nu, vi forgesis la interesajn temojn: DISKUT GRUPO kaj GRUPDINAMIKAJ METODOJ.

VI DIRIS, KE ONI POVIS ELEKTI UNU TEMON EL ĈIU BLOKO. KIUJN VI ELEKTIS ?

P. : Mi ĉeestis en REKLAMO, gvidata de Anton Oberdorfer; GRUPDINAMIKAJ METODOJ, gvidanto K. E. Salzmann; kaj MINORITATOJ.

J. : Mi partoprenis en REKLAMO; MINORITATOJ, gvidanto Hans Bakker; kaj DE INFORMO AL INFORMILO, gvidata de Peter Peeraerts.

TAMEN, MI SUPOZAS, KE NE NUR TIEL LABORIS, SED ANKAŬ AMUZIĜIS, ĈU ?

P. : Jes, certe. La urba konsilantaro de Darmstadt akceptis kaj regalis nin en la urbodomo; ni vizitis muzeon pri arto; kaj fakan altlernejon por inĝenieroj de informatiko. Tie la lerneja estraro donacis al ni ĉiuj belan rememoraĵon pri nia vizito. Iun nokton oni prezentis al ni la filmon "TAKTO". Ĝi estas nova esperantlingva filmo en moderna stilo, kun komentarioj pri Aŭstralio.

J. : Kompreneble, okazis ankaŭ tradiciaj kaj novaj kromprogrameroj; ekzemple: interkoniga vespero; silvestra balo kun "Feuerzangenbowle", tipa germana novjara brulanta punĉo; novjara traarbara ekskurso; konkurso pri praktika manipulado; ŝerca Supera Ekzameno, ktp. Krome estis okazo kolekti kaj diskutigi ĉiujn konstatitajn manipulaĵojn de la tago.

P. : Mi devas aldoni ankaŭ la amuzigajn noktajn festetojn en la Kalsono, Botelo, Truo ....

ĈU EBLUS RESUMI POR LA NEĈEESTANTOJ ĈI TIUN 16.an INTERNACIAN SEMINARION DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO ?

P. : Nu, junulara etoso, tre alta lingvonivelo kaj internacia amikeco estis la ĉefaj ecoj de la Seminario. Estis kelkaj malglataĵoj, jes, sed ili vere malaperis pro la jam kutima grandioza atmosfero kiu regas en ĉiuj junularaj aranĝoj. Tiu atmosfero logos nin al venonta Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo. Ni certe iros, kaj vi ?

*Alfkus Bukiŝ*

## BILBAO INVITAS VIN ....



Vª Franca-Hispana Renkontiĝo, 29ªn-30ªn de Junio kaj 1ªn. de Julio.

BILBAO "frukto de la kuniĝo de la maro kaj la monto" kiel skribis Unamuno, akceptos ĉi-jare, la Vªn. Francan-Hispanan Esperantistan Renkontiĝon, kiu kunigos precipe esperantistojn de apudpirineaj provincoj. Sed tio ne signifas ke ĝi, estas nur organizata por ili, tute ne ! ĉiu esperantisto enlanda aŭ eksterlanda povos partopreni kaj ĝui la amikan bilbaoan atmosferon kaj tutkoran akcepton.

Je la unua rigardo, eble Bilbao ne aspektas tre bele, antaŭ la okuloj de la ĵus alveninto. Urbo kiu enhavas preskaŭ 400.000 loĝantojn devas rezigni ion el sia ĉarmo, kiel pago al konstante evilvanta industrio, kies suprenĵetitaj fumoj grizigas la domojn kaj nebuligas la ĉielon. Tiel estas la postuloj de la progresoj !.

Ŝipkonstruejoj, ŝtalfandejoj kaj ĉiuspecaj fabrikoj amasiĝas sur la bordoj kaj laŭlonge de la rivero Nervión, kiu alfluante en la Kantabrikan Maron spegulas en siaj akvoj la konturojn de ĉiulandajn ŝipojn kaj karesas la kajojn de dekkvar kilometra haveno. La nomo de Bilbao estas en la koroj kaj lipoj de multaj maristoj kiuj nin vizitis.

En la urbo estas rimarkindaj du malsimilaj partoj dividitaj de la rivero, kaj kunigitaj de ses pontoj, la plej fama el ili, tiu de Sankta Antono figuras en la urba blazono. La dekstra parto nomata "Malnova kvartalo" estas la plej tipa, ĝi datas de la fondiĝo en 1300 kaj oni povas ĝin konsideri kiel ĉefa komerca centro. La domoj kaj preĝejoj de tiu-ĉi kvartalo gardas spurojn de pasintaj tempoj.

En la maldekstra parto de la rivero staras la


modernaj konstruaĵoj. La plej gravaj bankoj havas sian sidejon tie, la grandaj magazenoj kaj modernaj butikoj elmontras al la preterpasantoj la lastajn novaĵojn. Ĉi-tie estas la plej larĝaj stratoj, la belaj placoj kaj la parko. Ni ne volas plilongigi la raporton. Jam sufiĉas, do ne dubu venu ĉi-tien, la bilbaoanoj estas gastemaj kaj bonhumoraj, vi pasigos ĉi-tie tri agrablajn tagojn.

Nun, vi konos la programon :

VENDREDO 29an. DE JUNIO (Sankta Petro):

Je la sepa vespere:

Akceptado de la partoprenontoj en la Esperantista Grupo de Bilbao.
Teatra prezentado.
Lunĉo.



SABATO 30an. DE JUNIO:

9 Matene:

Sangodonado en la Hospitalo.
Oficiala aceptado en la Urbodomo.

4½ Posttagmeze:

Vizito al la Historia Muzeo de Bizkaja.
Promeno tra la urbo.

DIMANĈO 1an. DE JULIO:

Ekskurso al Guernika. Dum la irado sur la marbordo oni ĝuas mirindan pejzagon. La unua haltejo estas Bermeo, tipa fiŝkaptista urbeto, pli antikva ol Bilbao, haveno de iamaj balenkaptistoj. La kavernoj de Santimamiñe en la vilaĝo de Gauteguiz de Arteaga, enhavas surrokajn pentraĵojn de pratempaj artistoj, ili datas de antaŭ 30.000 jaroj. Krom la beleco de pentritaj bestoj, la kaverno perfekte lumigita permesas ĝui eksterordinarajn

momentojn, rigardante la stalaktitoj kaj stalagmitoj kiuj formas neimageblajn figurojn. La ekstera pejzaĝo de pinkovritaj montoj kaj ĉarmoplena valo faros neforgeseblan la vizito.

Fine, Guernika, historia urbo, fondita de Don Tello en la jaro 1.366. Dum jarcentoj la estroj de la diversaj vaskaj klanoj kunvenis sub kverko por krei leĝojn kaj ordigi la popolan vivon. Ankaŭ sub tiu arbo oni postulis de la kastiliaj reĝoj, kiel protektantoj de la vaska lando, la ĵuron pri respekto al la vaskaj privilegioj kaj leĝoj. Tiu kverko kiel legenda arbo figuras en la provinca blazono de Bizkaja.


Komuna bankedo en restoracio en frata kaj kamaradeca atmosfero adiaŭos la Renkontiĝon.

-$- P R E Z O J -$-


(1) Loĝado en hotelo kaj manĝoj
en restoracio ..................360 Pts.(potage)
Ekskurso al Guernika .........130 "
Bankedo .........300 "


Oni aranĝis la aferon tiamaniere, ĉar la plej granda parto de la ĝisnunaj partoprenontoj preferas loĝi kaj manĝi en la sama loko, sed tiu kiu preferas dormi kaj manĝi en la sama hotelo povas elekti kaj mendi tion.

Ankaŭ povas peti pli luksan loĝejon laŭ prezoj kiujn oni povas trovi en la Gvidlibroj de Turismaj Oficejoj kaj Vojaĝagentejoj.



# La MIRAKLO de Bilbao





Kion mi sekve rakontos, antaŭlonge okazis. Tiam, Bilbao, mia urbo, estis loĝata de nur dudek mil personoj, kaj ili ĉiuj estis konataj inter si.

Kelkaj Bilbaoanoj, ĝojemaj, deziris fari grandan ŝerctrompon, por ridigi la tutan loĝantaron.

Kaj tiel ili faris; ili publikigis en la urba ĵurnalo, ke, en proksima vilaĝo, ĵus mortis konata riĉulo, kaj ĉiuj liaj posedaĵoj estis disdonotaj inter ĉiuj lamuloj ĉeestontaj al domo de la ĉefa placo, je antaŭkonitaj horo kaj dato.

Grandan ĝuon kaj feliĉon eksentis la Bilbaoaj malriĉuloj kaj almozpetantoj, kaj, dum kelkaj tagoj, estis nepre aŭskulti la loĝantojn babilantajn pri la proksima evento.



Alvenis la atendita dato. En la pordego de la dirita domoaperis tablo, sur kiu kuŝis inkujo kaj papero, tri segoj, kaj tri aŭ kvar seriozmienaj viroj, parolantaj mallaŭte inter si.

Frumatene komencis alveni la lamuloj. La plimulto el ili venis kun du bastonoj kaj pendanta kruro, sed ankaŭ estis aliaj senkruraj surĉarete. Ili ĉiuj estis malgrasaj kaj palaj.


Kiam la horo alvenis, la placo estis plena je lamuloj. Tiuj kiuj vidis la spektaklon de la balkonoj, mirite demandis: Kiu povus pensi ke en nia urbo estus tiom da lamuloj?

La seriozmienaj viroj diris al la atendantaro ke, por pretigi la mondisdonon, ili devis momente fermi la pordon.

Tiel ili faris, kaj, post nelonge, la pordo malfermiĝis, kaj pli rapida ol fulmo, eliris...kion vi pensas? Taŭreto!!



Kiu povus rakonti tian tumultan malordon? Komencis la taŭro impeti, ĵetante unu kaj la alian..., kaj, antaŭ ol unu minuto, la placo malpleniĝis je homoj, kaj aperis plena je bastonoj.



Tiu estis la miraklo de Bilbao; kiam la taŭreto elkuris, ĉiuj lamuloj saniĝis.

(El "Guztien bein-beineko
(euskera

Tradukis ASIER

---

# Feliĉo de la Brasiko



La stulta papavo, la malsprita rozo
burĝonas nur, pompadas sen menso
kaj la aliaj, kiuj kolorriĉe, freneze
prezentas sin mem por ĉiuj kaj ĉie
ke povas ilin miri - kaj povas elrabi
kiuj ajn pasaĝeroj belecon de ili ....

Nu, bone, do faru ili, estu tiel, sed jen :
dume mi floras nur ene - por sole mi mem.

IZA TARJÁN




Ĉi jara 29ª IJK de TEJO okazos de 21ª ĝis 27ª de Julio en SARAJEVO. Ĉefa temo de la kongreso estas "Junulàro kaj Hom-Medio". La hom-medio estas nuntempe tre aktuala monda temo, kiu pli kaj pli engaĝas ankaŭ junajn homojn. La problemoj de la homa ĉirkaŭaĵo, pri kiuj oni asertas ke aperis unu flanke kiel sekvo de la alta grado de teknologia evoluo kaj aliflanke kiel sekvo de la malriĉeco kaj neevoluinteco, ricevas lastatempe ĉiam pli grandan atenton en ĉiuj partoj de la mondo.

Krom la labora parto, programo de la kongreso estos plenigita per laborkunsidoj, kulturaj kaj amuzaj aranĝoj, renkontiĝoj kun la loka junularo, vizitoj al junaj laboristoj en fabrikoj, ekskursoj kaj aliaj publikaj manifestacioj.

Kongres-urbo Sarajevo estas situita en la mezo de Jugoslavio. Konata estas, kiel eterna konflikto inter oriento kaj okcidento: religie, kulture, politike, historie..... Kiel ajn vi observas tiun ĉi ĉarman urbon vi trovos miksaĵojn kaj diversajn influojn. Pli ol 80 moskeoj ornamas ĝian orientan parton. De sur tiuj moskeoj, ankoraŭ funkciantaj, en antaŭvesperaj horoj oni aŭdas altan voĉon de muezino kiu invitas kredantoj al preĝo. Samtempe oni aŭdas sonorilojn, ĉu katolikaj aŭ ortodoksaj. Sed tio, kvazaŭ kunligas homojn kaj kvazaŭ sonoras pro la tradicio kaj historio.

Do, karaj junaj hispanoj tia urbo atendas vian alvenon. Se temo estas alloga por vi kaj se vi trovas

interesa tiun parton de Eŭropo, bonvolu veni.

Neniaj baroj por via alveno ekzistas ĉar vi, verŝajne vi tion scias, ne bezonas enirvizon por Jugoslavio.

MIRO HADŽIHASANOVIĆ

# Ĉiuj teruraj maŝinoj

Ĉu vi loĝas en vilaĝo?. Feliĉa vi estas, jes feliĉa ĉar vi ne konas tiujn terurajn maŝinojn, kiuj troviĝas sur la trotuaroj. Kiom suferigas tiuj trankvilaj maŝinoj al la scivolemuloj !! .

Vi, kiu estas inteligenta homo jam komprenis pri kiuj maŝinoj mi parolas, tiuj surstrataj pesiloj, kiuj estas tre ofte en la grandaj urboj.

Vi kiam promenas kaj vidas la priparolitajn maŝinoj tuj vi pensas ke ili estas sendanĝeraj. Vi tute eraras. Ili timigas multajn personojn, precipe tiujn kiuj apartenas al la t.n."malforta sekso".

**La alian** tagon mi vidis familion, kiu konsistis el gepatroj, filino kaj filo. La filino komencis ludi sur la pesilo. La patro, kiu laŭŝajne estis tre edukita persono, admonis la filinon, sed la patrino kontraŭstaris la patron ĉar ŝiaopinie la filino faris nenion riproĉindan, kaj vi imagu kio okazis poste.


La sinjorino invitis sian edzon supremiri la pesilon, sed li rifuzis (mi devas aldoni ke la sinjoro estis tre grasa) la delikatecon de sia edzino kaj pro tio komenciĝis terura disputado inter la geedza paro. Ŝi kritikis kin pro lia dikeco, ĉar, laŭ vortoj de la sinjorino - li ne aspektas viro sed sako plena de terpomoj -. Kompreneble la malfeliĉa ed

zo ege protestis kaj por defendi sin, li diris al sia edzino, kiu kulpas pri tio? vi, nur vi, kiu ĉiam preparas grasigajn manĝaĵojn, nur vi kulpas, aldonis la malfeliĉa edzo, kaj se ne, kial vi ne pesigas vin ?. Nenecese estas aldoni, ke ŝi ne akceptis la inviton de sia edzo.

Mi ne scias kiom daŭris la disputado, ĉar mi foriris. Sed amiko, amikino, vi ne dubu ke tiuj surstrataj maŝinoj estas danĝeraj. Ne multaj kuraĝas ilin utiligi, kia honto se iu rigardas nin !!.

Mi konstatis, ke la virinoj preferas koni sian pezon, per tiuj pesiloj kiuj troviĝas en la apotekeoj, ĉiam profitante la momenton, en kiu ili estas solaj aŭ maksimume kiam nur troviĝas la apotekisto. Rigardi virinon kiam ŝi staras sur tiu maŝino, estas unu el la plej grandaj senhontaĵoj.

Sed mi, kiu estas konscia homo, vin konsilas pro ke vi devigu vian amatan fianĉinon aŭ edzinon uzi tiujn maŝinojn, tio evitos al vi problemojn, problemoj, kiujn mi ne volas nun analizi kaj tio evidentigos ke tiuj danĝeraj maŝinoj ne estas tiel sed male. Kiel konvinki vian fianĉinon aŭ edzinon, tio estas afero, kiun vi mem devas solvi.



LUIS SERRANO PEREZ

(SABADELL)



# V.ª

# FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

## 29-30 Junio - 1 Julio 1973

# BILBAO

# PROGRAMO

29-6-1973 Je la 7.ª vespere, Akcepto de la partoprenantoj en la sidejo de la Grupo Esperantista de Bilbao, Teatra prezentado, Lunĉo.

30-6-1973 9'30.ª matene, Sangodonado en la Civila Sankta Hospitalo de Bilbao. Oficiala Akcepto en la Urbodomo.
2.ª Posttagmeze, Komuna Tagmanĝo.
4,30.ª Vizito al la Historia Muzeo de Vizcaya.
Vizito al la Internacia Specimen-Foiro.
Komuna vespermanĝo.

1-7-1973 Tuttaga ekskurso vizitante: Kastelo de Butrón, Baquio, Bermeo, Santimamiñe kaj Guernica.
Tagmanĝo en Guernica.

---

La Kavernoj de Santimamiñe estas unu el la plej vizitindaj lokoj kiujn Vizcaya prezentas al la vizitantoj. Kaŝitaj en idilia valo de pinkovritaj montoj. Havas en ĝia interno perfektan lumigadon, kiu reliefigas la konturojn de diversformaj stalagtitoj kaj stalagmitoj. Surrokaj pentraĵoj kiuj datas de antaŭ 30.000 jaroj estas la spuroj de pratempaj loĝantoj.

# V.ª FRANCA-HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

29-30 junio - 1 julio 1973 BILBAO (Hispanujo)

Mi aliĝas al la Internacia Renkontiĝo en Bilbao

Nomo kaj kompleta adreso: ..............................................

..............................................................................

..............................................................................

PREZOJ:

Dulita ĉambro en 1.ª klasa hotelo .......... 300 ptojn. ĉiutage
(Tranoktado kaj matenmanĝo)

Dulita ĉambro en 2.ª klasa hotelo .......... 100 ptojn. ĉiutage.
(Nur tranoktado)

Ĉiu Komuna manĝo en Bilbao ........... 120 ptojn.

Aŭtobuso por la Ekskurso ............... 130 ptojn.

Tagmanĝo en Guernica .................. 300 ptojn.

Metu strekon sub tio kion vi elektas kaj sendu la aliĝilon tiel baldau kiel eble. Limdato por la aliĝo: la 15ªⁿ de Junio 1973.ª Kiu deziros rezervi lokon en 1ª klasa hotelo skribu al la Turisma Esperanto-Sekcio ĉe Inés Gastón. Paseo Marina Moreno. 35 - 4.º D. ZARAGOZA (Hispanujo).

Por rezervo en 2ª klasa hotelo, al la Sekretario de la Grupo Esperantista de Bilbao, str. Barrencalle Barrena, 7 - 1ª - BILBAO.